

Pri koncepto de Scienca Revuo

Josef Kavka (Ĉeĥoslovakio)

Kiam mi decidiĝis akcepti la taskon ĉefredaktoran, mi neniel estis novulo en la "metio", redaktinte fakaĵojn dum jardekoj — ĉu nacilingve, ĉu en Esperanto. Tamen, okaze de SR, dekomence min embarasis la grava koncepto-problemo. Unuflanke insistis radikaluloj, ke SR devas esti original-esplora, ne populariga, kun la strikte laŭ-temaj, ne "mikspotaj" kajeroj, sen ajna organiza enmetaĵo pri ISAE, pri Esperanto-aktualaĵoj, pri esperantologio k.s. Sole tiaspecan revuon — laŭ ilia, sendube boninteca, opinio — eblas ambicie montri al faka publiko. Aliflanke ne mankis SR-legantoj kun opinio tute mala: oni prezentu sole kajerojn kun miksita enhavo, kun Eo-aktualaĵoj k.s.

Ĉar dum la jarkunveno de ISAE en Antverpeno (1982) revigliĝis la diskuto pri la problemo, mi turnas min al la SR-legantoj kun jena demando:

- 1.1. Ĉu SR servu esklude por "klerigi kaj amuzi ŝatantojn de la scienco kaj teĥniko?" Aŭ:
- 1.2. Ĉu ĝi prefere alportadu originalajn traktaĵojn, kiuj kontribuu al pli rapida ellaboriĝo de la fakaj terminologioj? Aŭ:
- 1.3. Ĉu ambaŭ artikol-specoj aperadu en SR?
- 2.1. Ĉu SR-kajero estu strikte laŭ-tema, ekz. el unusola scienco? Aŭ:
- 2.2. Ĉu ĝi enhavu artikolojn el vasta scienc-grupo? Aŭ:
- 2.3. Ĉu ĝi estu kalejdoskope miksita, senkonsidere pri aparteno al soci- kaj natur-sciencoj, teĥniko, esperantologio k.t.p.?
- 3.1. Ĉu iuj kajeroj estu laŭ 2.1. kaj laŭ 2.2. aliaj 2.3.? Aŭ:
- 3.2. Ĉu neniu kajero estu laŭ 2.3.?

Kvankam mi konscias, ke — dum mi plenumos la funkcion — neniu liberigos min de la respondeco pri SR-koncepto, tamen mi ŝatos esti bone informita pri koncernaj opinioj de la SR-legantaro.

Tial mi anticipu dankegas pro ĉiu letero pri la problemo.

J. Kavka

Aminoacidoj kaj nombroj

*M. T. Popov (Sovetio)**

Aminoacidoj estas molekuloj de vivo, la plej vaste kaj la plej ofte uzataj struktur-ĥemiaj unuoj de la molekula biologio. El ili estas konstruitaj ĉiuj proteinoj; ekzistas proteinoj, kiuj laŭ la programo de DNA muntas aliajn proteinojn inklude la similajn al si mem. En la homa organismo troviĝas minimume miliono da diversaj proteinoj, konsistigante duonon de la seka maso en nia korpo. En la proteinoj troviĝas dudek aminoacidoj; dekok el ili enhavas sole atomojn de kvar specoj: karbono, nitrogeno, oksigeno kaj hidrogeno; en la restaj du estas krome po unu atomo de sulfuro.

La nomoj de aminoacidoj kaj ilia atoma partopreno estas prezentitaj en tab. 1. Sub n-ro 0 en ĝi estas donita konsisto de funkcia grupo de aminoacidoj, kiu estas kvazaŭ kapo de la molekulo; tiun «kapon» havas ĉiu aminoacido. «Vosto» de la molekulo nomiĝas flanko aŭ radikalo; ĝi malsamas en diversaj aminoacidoj.

Elektronoj en atomoj formas tavolojn (ŝelojn): en C, N, O, S, H, la ekstera tavolo enhavas respektive 4,5,6,6,1 elektronojn. Se oni multiplikas la nombron de la ĉiuspecaj atomoj per la nombro de iliaj eksteraj elektronoj kaj se oni sumigas la produktojn, oni ricevas kvanton da elektronoj en la ekstera tavolo de aminoacido. Ekz. por asparagina acido: $4.4 + 1.5 + 4.6 + 7.1 = 52$.

De la suma kvanto da eksteraj elektronoj en ĉiu aminoacido ni subtrahu 29, t.e. la nombron de l'eksteraj elektronoj en la «kapo». Ni ricevas la nombrojn, skribitajn en la dekstra kolumno de tab. 1.

kandidato de fizik-matematikaj sciencoj, docento de fiziko en PedagoGia Instituto, *Melito-polska 4-12, SU-332440 BERDJANSK*